
 **ESPERANTO** 
PROVENCE

Bulletin de la Fédération de Provence

REDAKTEJO	Trimonata Bulteno Vintro 03-04
ESPERANTO	Abono 7,50 €
15, boulevard Gambetta	Numero 56
83460 LES ARCS	Retadreso: jcroget@wanadoo.fr
Tel: 04 94 47 52 43	

Ni bondeziras al ĉiuj, feliĉan novan jaron 2004 !

Memoru la "skotan dirajon" : mi ege bedaŭras sed, nova jaro nova pago, do sendu ĉekon pri via abono al Esperanto-Provence je la adreso de la redakitejo

Ankaŭ ĉi-jare tuj partoprenu la "débat national" ĉe www.debatnational.education.fr

Ĉi-jare, la regiona federacio bezonos vian helpon kaj ĉeeston dum la landa kongreso de franca Esperanto, kiu okazos en La Roque d'Anthéron de la 19a ĝis la 24a de majo; kiel helpi: akcepto; tradukado; gvidado de ekskursoj ... Informu viajn konatojn

La 9an de majo, okazos "Bunto en Strasburgo", ni planas lui aŭtobuson por amaspartopreni la Eŭropan Bunton kun ĉiuj kiuj interesiĝas pri kulturdefendado en Eŭropo. Sin anoncu.

TEMPLIMO por kontribuajoj al la venonta bulteno : la 02an de APRILO

Vivo de la grupoj

(Respondeculoj bv sendi viajn informojn se vi deziras ke ili aperu ĉi tie)

Aix en Provence (13): lunde unuagrada kurso gvidata de Sylvaine Le Magadure

Arles (13):

Avignon (84): kursoj: ili funkcias laŭ tri niveloj ĉiusemajne:

lunde: unuagrada kurso gvidata de Simone Humm.

merkrede: unuagrada kurso gvidata de Rose-Marie Quintin.
triagrada kurso gvidata laŭvice de kursanoj mem.

jaŭde: duagrada kurso gvidata de Francis Brieule.

Cannes (06): kursoj merkrede posttagmeze

Fréjus-St Raphaël (83): la kursoj reekis la 15an de septembro lunde posttagmeze

Gap (05):

La Roque (13):

Manosque (04): la unua kaj tria merkredon de la monato je la 18a ĝis la 20a, oni kunvenas, ĉu en Manosque, ĉu en Villeneuve

Marseille (13):

Martigues (13):

Nice (06):

Orange (84):

Taradeau (83) : kursoj jaŭde

Toulon-La Ciotat (83): Kursoj por progresantoj kaj komencantoj merkrede 17h15-19h30 en Maison de quartier, Fontsanter

OKAZOS

6an-7an de marto: Printempa lingvostaĝo (eble ĉeestos Italoj el Chiavari), ĉe UFCV, Saint Raphaël, kaj la 7an matene je la 10a horo, Federacia ĝenerala kunveno, kiu elektos novan komitaton, kiu, posttagmeze, elektos novan estraron.

Por la staĝo, vidu aliĝilon je paĝo 5.

Ni pripensu, ĉu ni devus organizi ekzamensesiojn po departemento ?

9an de majo: Bunto en Strasburgo (Ĉu buso el la regiono?)

19an-24an de majo 2004: Landa kunveno de franca esperanto en La Roque

Julio 2004: UK en Pekino

OKAZIS

20an de septembro Fréjus: vizito de Ruso, kiu unuafoje spertis parolajn kontaktojn kun eksterlandanoj

4an de oktobro La Ciotat: partopreno al "Forum du livre engagé"

4an de oktobro Mouans-Sartoux: Budo ĉe "Fête du livre"

19an de oktobro Saint Raphaël: Post nuligito de la aŭtuna federacia kunveno pro manko de aliĝantoj, "Hispana gastejo" ĉe Prezioso 22 ĉeestantoj

24an-26an de novembro Aix kaj La Ciotat: vizito de Madis Linnamaĝi el Tartu (Estonio), tiu lando membriĝos en Eŭropa Unio.

7an de decembro Cannes: Zamenhofa tago, dudeko da ĉeestantoj el kiu estis bulgara paro

Jen teksto de letero, kiun UFE sugestas ke ni sendu al nia propra deputito :

Monsieur le Député,

Le 26 septembre dernier était "Journée Européenne des Langues". Cet événement a éveillé bien peu d'échos dans le public. Mais les députés européens, eux, ont souvent montré qu'ils sont bien concernés et intéressés par le problème des langues européennes, le respect de leur diversité, la nécessité de les défendre contre les risques d'hégémonie et de discrimination en faveur d'une langue nationale privilégiée.

Tous les députés européens sont attachés au multilinguisme qui est garantie d'équité et de démocratie pour le fonctionnement des institutions et pour l'information aux citoyens. Tous sont attachés à la diversité linguistique et culturelle de l'Europe, que défendent également les espérantistes. Plusieurs députés se sont officiellement déclarés favorables à la promotion de l'espéranto comme outil de communication international. Ils sont bien convaincus des possibilités de l'espéranto, des avantages qu'il offre de précision, de neutralité, d'objectivité. Ils appuient souvent nos démarches et réagissent aux informations que nous leur communiquons régulièrement depuis plus de quatre ans. Certains députés ont suggéré l'utilisation de l'espéranto comme langue relais pour leurs débats au Parlement et pour leurs comptes rendus, envers et contre la pression des traducteurs et interprètes.

Cependant les espérantophones - et notre association "Espéranto-France" en particulier - savent bien que l'espéranto fonctionne parfaitement. Près de 2 000 d'entre eux, venant de plus de 60 pays (180 pour la France), viennent de participer pendant une semaine au congrès mondial de Göteborg en Suède. Nombreux sont ceux qui ont travaillé dans des réunions thématiques et débattu de littérature, de philosophie, de science, de technique, de médecine, toujours sans interprète et sans aucun problème.

A titre d'information, vous trouverez ci-joint, traduit en français, le texte de la résolution sur les droits linguistiques qui a été adoptée au cours de ce congrès de Göteborg. Nous y joignons 2 textes adoptés en juin par l'assemblée générale d'Espéranto-France. La "Déclaration de l'association Espéranto-France" définit nos propositions pour des essais d'utilisation de l'espéranto dans les instances européennes et dans le système de l'éducation nationale. La "Charte proposée aux partis politiques" demande à ceux-ci d'en inclure les bases dans leurs programmes politiques.

Ces mêmes textes seront soumis aux listes de candidats pour les élections européennes de 2004. Nous serions très heureux si vous pouviez nous faire connaître votre avis et vos remarques sur ces documents, compte tenu de votre connaissance actuelle des affaires européennes.

Nous vous prions d'agréer l'expression de nos sentiments respectueux.

Se vi decidias sendi tiun leteron, bonvolu nin demandi la tekston (en la franca) de la tri deklaroj (Goteborg kaj UFE). Ni nepre sendos ilin al vi.

Por pli bone vivi.

Plene ĝuu ĉiun tagon kaj ke la mondo renaskiĝu ĉiun matenon !

Estu feliĉaj por feliĉigi la aliajn, kaj precipe malavare amu. La amo manko elvokas dezerton sen oazo ; rozon, kiu senfoliiĝas, triste velkinta.

Lernu sekvi la konsilojn de Roza Luxembourg : « Kiam oni havas la malbonan kutimon serĉi venenan guton en ĉiu floro, oni trovas ĝis sia morto ian kialon por lamenti. Do, prenu la aferojn sub la mala angulo kaj serĉu mielon en ĉiu floriĝo ; vi ĉiam trovos ian kialon de serena ĝojo... »

Ne atendu, ke malsano aŭ akcidento senmovigas vian korpon por ekkonscii, ke vi havas gambojn por esplori la mondon ; okulojn por ekstazadmiri la belaĵojn de la naturo ; manojn por karesi, krei belecon kaj bonecon ; orelojn por precipe aŭskulti la aliulojn, iliajn dolor-kaj ĝojkriojn.

Trinku ĉe la fonto de la bona humoro, de la gajeco. Tiel kiam vi travivos afliktaĵojn, vi povos ĉerpi el viaj lumaj trezoroj...

Penu por ŝanĝi la pluvguton en kristalbulon ; por transformi la malamon en amon, la egoismon en altruismon, la indiferencon en komprenemon.

Ne forgesu, ke la espero estas brileto helante la tunelon, la forto, kiu vivigas kaj kreas miraklojn, kiel la printempa suno. Praktiku ĝin ĉar estas bona ekzerco de kuraĝo, pensmaniero, korinklino, kaj en la esperlando ne estas vintro.

Karaj geamikoj, ke miaj vortoj lumigu vin kiel suno...

Michèle Freud

NIA PACOAZO	EN NIA ENO
ej! kun emfazo	Antaŭ la steloj
verdas en la dezerto	Ni ĉampionas, amikoj
nia oazo!	Drivas la veloj
inter ĉiel' kaj tero	Sur la esperanta mar'
ĝin helpas la vetero	Al morgaŭa lumalar'
pluvivi pace,	Trans la milito
kvankam nepras aserto:	Sub sanigaj efikoj
ĉiam aŭdace!	Ni, la elito

Fra Gaeta

HONORARIO

Kruko, kiu pretendas esti poeto, tre fiere parolas kun sia amiko: Mi estas ege kontenta. Por mia lasta poemeto mi ricevis 40 eŭrojn.

Baniko respondas envieme: Kiu eldonejo akceptis vian poemon?

Kruko: La poŝto. Mi forsendis la poemeton per registrita letero, kiu perdiĝis. Protestinte, mi ricevis 40 eŭrojn por la perdita sendaĵo!

PRINTEMPA KUNVENO - MARTO 6an kaj 7an - 2004
 ĉe UFCV, boulevard Jean Dorat Saint Raphaël
 ALIĜILO sendota antaŭ la 15an de februaro al
 Espéranto 15, boulevard Gambetta 83460 LES ARCS
 Redaktu vian ĉekon je la nomo: Esperanto-Provence

NOMO.....ANTAŬNOMO.....

Partoprenos la kunvenon jene:

POKAPE

TUTO

Tuta restado, kaj, plie sabato tagmeze 40 eŭroj X

Tuta restado, sen sabato tagmeze 30 eŭroj X

Sola partopreno, sen manĝo kaj nokto: 12 eŭroj X

Individua manĝo

Sabato tagmeze 12 eŭroj X

Sabato vespere 12 eŭroj X

Dimanĉo tagmeze 12 eŭroj X

SUMO

PARTOPRENI NUR LA ĜENERALAN KUNVENON ESTAS SENPAGA

